

N. N. 34,

Estis plena mia ĉaro

tradukita de Joachim Gießner

1. Estis plena mia ĉaro
de maljunulinoj;
tra la urbo ili fie
sakris tuj sen fino.
Do sankte mi nun ĵuru:
maljunulinoj ne veturu.
Tiru, tiru, ĉeval', tiru, ĉeval'!

2. stis plena mia ĉaro
de maljunaj viroj.
Dum veturo tra la urbo
sonis aĉaj diroj.
Do sankte mi nun ĵuru:
olduloj ne plu kunveturu.
Tiru, tiru, ĉeval', tiru, ĉeval'!

3. Estis plena mia ĉaro
nur de junulinoj;
tra la urbo ili kantis
hele kaj sen fino.
Do sankte mi nun ĵuru,
ke nur knabinoj kunveturu,
Tiru, tiru, ĉeval', tiru, ĉeval'!

...

*Traduko de la Germana poemo "Hab' mein Wagen" de N. N. 34 en Esperanton de JOACHIM GIESSNER (*1913-12-23 – †2003-11-25).*

Arg-622-1257 (2012-10-22 07:10:32)

Tiu traduko troviĝas en <http://www.esperanto.de/kantoj/index-giessner.html> sub <http://www.esperanto.de/kantoj/kantoj.pdf>. Pri Joachim Gießner vidu la vikipedian retejon http://de.wikipedia.org/wiki/Joachim_Gie%C3%9Fner.